

BELGA ESPERANTISTO

47a Jaro — N-ro 7a — Julio-Aŭgusto 1955a

Fondita
en 1908a

Redaktoro-Administranto:

la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Abonprezo:

Fr. 100,-

Pripensu

„La ĉi suba artikolo, kun iom persona enkonduko, ŝajnas al ni tamen sufiĉe grava por aperi kiel ĉefartikolo en tiu ĉi numero kaj ni ne dubas ke ĉiuj legantoj bonvolos pripensi ĝiajn konkludojn”. N.d.l.R.

La historio instruas al ni, ke maljunaj, se pli plaĉas al vi, malpli junaj personoj, ankoraŭ bone povas gvidi organizon, movadon ktp. Ekzistas konata nederlanda esprimo: de oudjes doen het nog goed.

Per tiu ĉi vortoj oni volas esprimi la ideon, ke pli aĝaj personoj certe kapablas fari la samon kiel junaj. Sed, tiuj ĉi vortoj ne estu la direktivoj por nia movado. Certe, la ekzistanta estraro laboras energie. Bone komprenu min, mi ne volas diri ke la estraranoj ĉiuj apartenas al la katagorio: grizharuloj. Certe ne. Tamen, en la jarkunveno oni aldonis al tiu estraro personon, kiu jam atingis la aŭtunan aĝon. Eĉ pli. Kompreneble mi dankas la membrojn pro la fido kaj faros mian eblon kontentige labori, sed, pli bone estus estinta, kiam estus elektita juna persono. Ne nur psike sed ankaŭ fizike. Por la asocio estus pli bone.

La fakto estas, ke kaj en nia asocio kaj en la internacia, la gvidantoj estas grandparte personoj kiuj jam plurlonge postenas, kaj tio ne estas bona por la interna forto de nia afero.

Nepre necese estas ke nova, juna sango alfluu.

Eble oni diras ke la maljunaj personoj havas pli da sperto ol la junaj. Akceptite. Certagrade oni pravus, sed aliflanke tiu penso esprimas specon de inerteco. Kaj tiu inerteco estas granda malamiko en nia rondo esperantista.

Kelkaj optimistoj jam pensas pri baldaŭa finvenko de Esperanto. Tiam la organizaĵoj ne plu havos ekzistotrajton. Tiu ĉi momento ankoraŭ ne estas videbla.

Multe da laboro estas fareda. Ĉiam denove ni devas klopodi kapti la interesigon de la „publiko” kaj oni ne

Post la 3a Beneluksa Kongreso



(Fotografajo de „Persfotobureau”, Utrecht)

Tiu ĉi grupfotografajo de la 3a Beneluksa Kongreso, okazinta en Utrecht dum la Pentekostaj tagoj, estas ankoraŭ akirebla. Ĝi reprezentas la kongresanaron kun, en la mezo de la unua vico, la tri prezidantoj de la organizintaj Ligoj (de mald.dekstren): S-roj Maur. Jaumotte, prezidanto de R.B.L.E.; Blokker, prezidanto de L.E.E.N. kun edzino kaj G. Debrouwere, prezidanto de Flandra Ligo. Pli dekstren estas ankaŭ klare videblaj: S-roj H. Sielens kaj G. Maertens, ĝeneralaj sekretarioj de Belga kaj Flandra Ligoj kaj tute dekstren: S-ro Koudijs, la vigla prezidanto de la L.K.K.

povas postuli ke maljunaj personoj daŭre tiel energie laboras kiel junaj povas fari. Krom tio estas fakto ke junaj, entuziasmplenaj, entreprenemaj homoj disponas pri pli freŝaj ideoj. Almenaŭ oni povas atendi tion! El tiuj ĉi kelkaj pensoj oni povas facile konkludi ke la tempo estas matura por la jenaj pripensoj:

1. La Esperantomovado nepre bezonas novan sangon, alie, mi timas ke nia movado post ne longe montros simptomojn de anemio.

2. Ni nepre devas konsideri kiamaniere ni povas solvi la problemon.

3. Pli ol ĝis nun la sekciaj estraroj (pluraj ankaŭ konsistas el ne-junaj personoj) sin okupu pri la demando:

kiamaniere ni povas kapti la junajn personojn por anstataŭi la maljunajn.

4. Por plifortigi nian movadon ne sufiĉas doni kursojn por varbi novajn membrojn. La interna propagando estas egale necesa kiel la ekstera.

5. Ni devas klopodi interesigi la junajn membrojn por organiza laboro.

Jen kelkaj pripensoj. Solvi la problemon ne estas facile sed ni devas komenci, nun, pripensi la aferon.

Mi ne trograndigis la aferon, mi ne estas pesimisto, male. Mi nur konstatas faktojn.

Pripensu ilin kaj kiam vi povas prui ke mi eraras, mi estos la unua, kiu ĝojos pri sia malpraveco.

Edew.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Brnylaan, 44, Wiirijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falcon-
 ruil, 21, Antverpeno.
 (Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Esperantista Paro

Ofte okazas en Societo, - kaj do ankaŭ en Esperanto-Grupo, - ke membro kaj membrino geŝanĝigas kaj geedziĝas.

Grandaj esperantistaj renkontigoj estas same okazoj por pli intimaj renkontigoj, kiuj kondukas al la sama rezulto.

Tiel la unua Beneluxa Kongreso en Antverpeno estis okazo por membroj apartenantaj al du tre amikaj, sed tamen diversaj grupoj ekkonatiĝi, rerenkontiĝi kaj fine geŝanĝiĝi.

Kaj antaŭ kelkaj tagoj okazis en Bruĝo la geedziĝo de la fidela, vigla kaj ĉarma membrino de la Bruĝa Grupo F-ino Paulette De Staercke kaj de S-ro Charles Van Gompel, simpatia kaj cetero same vigla membro de „La Verda Stelo“ de Antverpeno.

Reĝa Belga Ligo Esperantista rediras ĉi tie la gratulojn, kiujn ĝi, same kiel la du Grupoj, sendis al ambaŭ, okaze de tiu ĝojiga okazintaĵo.

Longe kaj feliĉe vivu la juna esperantista paro.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stela“

(Poŝtĉekkonto: 726.54)

Kiel jam dirite en nia antaŭa numero la 24an de junio okazis la diplomdisdono al la lernintoj de la somera kurso, gvidita de F-ino Henny De Ketelaere.

Inter la diplomitoj meritis apartan mencion la tre juna fraŭlino Van Havermaet, kiun la prezidanto speciale gratulis, same kiel la aliajn diplomitojn, nome F-inoj Smet kaj Neeckx (plej granda merito); S-roj Beyers kaj Van de Bempt, F-ino Vervoort kaj S-ro Loquet, (granda merito); S-ino Blondeau kaj S-ro Thoen (merito) kaj S-roj Sporen kaj Van der Zijpen (sukceso).

Post gratuloj kaj konsiloj de la Prezidanto, F-ino Van Havermaet alparolis la profesorinojn, kiun ŝi, nome de ĉiuj, dankis kaj al kiu ŝi transdonis belan memorigan donacon.

Kaj F-ino De Ketelaere, tre tuŝita, kore dankis kaj faris alvokon por la perfektiga kurso, gvidota de ŝia patro.

La saman vesperon, la kabareta sek-

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
 RADIO kaj GRAMOFONO

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe

BELGOMINE

FRANKRIJKEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

membroj, inter kiuj ni citu S-ron H. Hof-
 fejon, kiu ne regule povas ĉeesti, sed
 kiu, inter krampoj, anoncis ke li baldaŭ
 gvidos kurson en Brasschaat, inter la stu-
 dentaro de tiu grava komunumo de la
 Antverpena aglomeraĵo. Itala samideano,
 loĝanta en Parizo vizitis kaj salutis la
 Grupon.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Oni atentu ke diversaj ŝanĝoj okazis
 en la programo post la dissendo de la
 presita programeto por la tria kvartalo
 de la jaro).

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frank-
 riklei 4, je la 20.30a h. (1-a etaĝo):

Aŭgusto: la 5an: Parolata ĵurnalo: la
 12an: Antaŭ 20 jaroj: Festoj kaj funebro
 (lumbildo); la 19an: pro la antverpena
 kermeso: ne okazos kunveno; la 26an:
 Raportoj pri la libertempo.

Septembro: la 2an: Parolata ĵurnalo
 kaj libertempaj rakontoj; la 9an: Liber-
 tempaj travivaĵoj; **Kaj, por brile komenci**
la novan laborsezono:

la 16an: Parolado kun lumbildoj de la
 pioniro S-ro Jan Jacobs: „Vojaĝo al His-
 panujo“;
 la 18an: Vizito al la laborejo
 de la skulptisto F. Everaerts, kies bil-
 don de D-ro Zamenhof multaj posedas
 aŭ ĉiokaze konas. Kunveno je la 14a
 horo, sur la Victorie-plaats: ramo de
 Broechem;

la 19an: Malfermo de la unua vintra
 kurso, enkondukota de la Prezidanto kaj
 gvidota de F-ino Henny De Ketelaere;
 kaj de la perfektiga kurso gvidota de
 S-ro Morris De Ketelaere.

BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La dua parto de la kunveno de la 21a
 de junio, post la unua hora leciono, estis
 dediĉata al pliaj memoraroj el la kon-
 greso de Utrecht, per legado de artikoloj
 el „De Esperantist“ kaj „Heroldo“.

La 28an de junio, en la kadro de la
 parolata gazeto, S-ro L. Van Wassenhove
 parolis pri „Historio de Skoto“ kaj F-ino

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

Moderna komforto

Sidejode „Bruĝa Grupo Esperantista.“

Tel. 314.59

P. de Staercke prezentis belan artikolo-
 lon pri „Cézanne, pioniro de la moderna
 pentrarto. „Je tiu okazo, la prezidanto
 dankis la parolantaron pro ŝia regula kaj
 valora kunlaboro al la parolata gazeto kaj
 gratulis ŝin antaŭvide al ŝia baldaŭa edz-
 iniĝo, tamen bedaŭrante ke tiu feliĉa okaz-
 onto forigos ŝin de la grupo, ĉar ŝi eklo-
 ĝos en Antverpeno. Disaŭdigo de kelkaj
 elektitaj diskoj, pruntedonitaj de S-ro W.
 Van Werveke, pliagrabilis la lastan par-
 ton de la vespero.

La kunveno de la 5a de julio estis vi-
 zitata de tri jubileantaj membrinoj, kiuj
 ne povis ĉeesti la festkunsidon de la 20a
 de marto. La prezidanto profitis tiun o-
 kazon por disdoni al ili, — el la nomo
 de nia Liga prezidanto S-ro M. Jaumot-
 te, — la jubilean medalon de RBLE., no-
 me al F-ino Alice Boereboom, nuna vic-
 prezidantino, grupanino ek de 1919; al
 S-ino M. De Baets-Huyghe, vicprezidin-
 tino, grupanino ek de 1930 kaj al F-ino
 Maria Verbeke, estrino de la grupa side-
 jo „Cornet d'Or“, grupanino ek de 1927.
 Tiu lasta afable regalas la tutan ĉeest-
 antaron per honora vino kaj la kunveno
 finiĝis en plej gaja atmosfero. Dum la
 postaj tagoj delegacio de la komitato por-
 tis la jubilean medalon al S-ino M. Al-
 grain, honora vicprezidantino, kaj al F-
 ino A. Algrain, ambaŭ grupaninoj ek de
 1923, al 1923, al S-ino H. Moens (1927),
 al S-ro H. Van Roye (1927) kaj al S-ro
 Jozef De Coster (1928), kiuj ĉiuj, pro
 malsano, ne povis ĉeesti la festkunsidon
 de la 20a de marto. La veterana medalo

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

La Profesoroj diplomitaj dum la unua Duonjarcento

En la daŭro de la unua duonjarcento de sia ekzisto, R.B.L.E. organizis dekdu
 fojojn, en diversaj urboj, specialajn edzamenojn por la akiro de la diplomo pri
 profesora kapableko.

Ni donas ĉi sube la nomojn de la cento da profesoroj, kiuj akiris tiun diplo-
 mon kaj inter kiuj 16, kies nomoj, estas grase presataj, estas, nun ankoraŭ,
 membroj de la Ligo.

1-a Ekzameno: Bruselo: 7/7/07

estis jam transdonata al F-ino Yvonne
 Thooris, Honora Prezidantino, membrino
 ek de 1906, la 22an de majo.

La kunveno de la 12a de julio estis
 dediĉata al legado de „Belga Esperan-
 tisto.“

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Ordinara kunveno ĉiumarde je la 20a,
 en la sidejo: „Gouden Hoorn — Cornet
 d'Or“, Simon Stevinplaats 2.

Ĝis la 16a de aŭgusto, dum la unua
 horo de ĉiu kunveno: Elementa kaj per-
 fektiga kurso por novaj kaj malnovaj
 membroj.

Aŭgusto: 2an: Triopa interparolado; 9-
 an: Novajoj pri la Universala Kongreso
 en Bolonjo; 16an: Parolata gazeto; 23an:
 Muzika vespero; 30an: Libertempaj me-
 moraroj.

Septembro: Meze de la monato komen-
 ciĝos nova kurso por komencantoj. De
 nun propagandu kaj varbu!

FAMILIA KRONIKO

Kondolencoj:

Al S-ro David Demeulenaere, vicprezi-
 danto de la Bruĝa Grupo, administranto
 de RBLE., pro la morto de lia amata
 patrino, S-ino Demeulenaere-Vergison.
 (28/6/55).

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉekkonto 12.30.48)

La 3an de julio okazis, kiel kutime, la
 fama Parolata ĵurnalo, kiu iĝis granda
 sukceso kaj en kiu S-ro Castel plej bone
 laboris.

La 11an, F-ino Isaacson pritraktis la
 temon „Silko-Artoj“ kaj alportis tre in-
 terasan dokumentaĵon.

La 18an, F-ino Kestens organizis pro-
 menadon tra la malnova Bruselo kaj kon-
 dukis al la Arkpafista trinĝejo.

La 25an, S-ino Elly Staes, S-roj Vander
 Stempel kaj Castel aranĝis gajan vespe-
 ron kaj legis, ĉu amuzajn ĉu interesajn
 artikolojn.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtubuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

S-ino A. Broymans-De Schutter (Antv.)
 F-ino Berthe Ledene (St. Mich. Brugge)
 F-ino C. Simon (Bruselo)
 S-ro Carlos-Luis (Italo el Parizo)
 S-ro Octave Chalon (Bruselo)
 S-ro Armand Giminne (Bruselo)
 S-ro E. V. Honinckx (La Plante)
 S-ro Emile Van Weyenberg (Bruĝo)

2-a Ekzameno: Bruselo: 12/4/08

F-ino Céline Giffrois (Antverpeno)
 F-ino Eugénie Gunzburg (Antverpeno)
 F-ino Maria Posenae (Antverpeno) *)
 F-ino Anna Guillaume (Bruselo)
 F-ino Louise Hoffmann (Bruselo)
 S-ino Maria Claessens-De Deken (Ant.)
 S-ino Fél. Staes-Vandervoore (Brus.)
 S-ro Victor Claessens (Antv.)
 S-ro Rubin Untermann (Antverpeno)

3-a Ekzameno: Antverpeno: 20/6/09

F-ino Maria Berten (Antverpeno)
 F-ino Paula De Jaegher (Antverpeno)
 F-ino Jeanne Casie (Antverpeno)
 S-ro Camille Babilon (Antverpeno)
 S-ro Jan Jacobs (Antverpeno)
 S-ro Léon Schumacher (Antverpeno)
 S-ro Florent de Keyser (Antverpeno)
 S-ro M. Roe (Borgehout-Antv.)

4-a Ekzameno: Bruselo: 8/5/10

F-ino Maria Moreau (Bruselo)
 F-ino Leona Solvyns (Antverpeno)
 S-ro Raymond Leseul (Antverpeno)
 S-ro Fernand Mathieux (Bruselo)
 S-ro Louis Van Aubel (Lieĝo)

(Sekvo en proksima numero)

*) F-ino Maria Posenae estas nia bona
 samideanino S-ino Maria Elworthy.

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Aŭgusto: La 1an: Parolata ĵurnalo; la
 8an: Raporto pri la Internacia Kongreso
 en Bolonjo; la 22an: Amuza vespero; la
 29an: Parolado de S-ino Daems pri la
 Internacia Teksajo-Ekspozicio.

Septembro: la 5an: Parolata ĵurnalo; la
 12an: Parolado de S-ro Nélis pri „Emile
 Verhaeren“; la 19an: Perfekta kurso de
 S-ro Vander Stempel.

40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bologna, Italujo, 31.VII - 6.VIII 1955

N-ro 8 OFICIALA KOMUNIKO junio 1955

Limdato: post 30 junio LKK NE PLU AKCEPSAS ALIGOJN;
post 30 junio LKK fermas siajn kontojn. NE PLU SENDU MONON. Krome ne plu mendu litojn kaj ekskursojn.

Specialaj kartoj: Kiuj venos al Bolonjo ne antaŭe aliĝinte al la kongreso, povos aĉeti ĉe la Kaso (la Universitato) SPECIALAN KONGRESAN KARTON sen numero. Personoj, kies aliĝo ne atingis LKK antaŭ la fino de junio, devos uzi tiun rimedon do partopreno en la kongreso. Kun la karto LKK donos ankaŭ Kongresan Libron kaj insignon.

Kongresa Libro estas sendita al ĉiu aliĝinto meze de junio.

Statistikoj: Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 25, Belgujo 17, Brazilo 3, Britujo 87, Cipro 1, Cinujo 1, Danujo 44, Egiptujo 1, Finnlando 50, FRANCUJO 287, Germanujo 124, Hispanujo 8, Indonezio 1, Irlando 3, ITALUJO 294, Izraelo 2, Japanujo 1, Jugoslavio 94, Kanario 1, Kubo 1, Maroko 24, Nederlando 156, Norvegujo 39, Novzelando 3, Portugalujo 6, Sarlando 2, Sudafriko 1, SVEDUJO 162, Svislando 33, Turkujo 1, Urugvajo 3, Usono 15, Venezuelo 1. Sumo el 34 landoj 1494. Interesaj ciferoj: nemembroj de U.E.A. 28 %; instruistoj 18 %; dommastrinoj 13 %; oficistoj 7 %; studentoj 6 %; gejunuloj sub 20 jaroj 7 %.

Nomo de la LKK
Mason Stuttard, K.K.S.

Kiel rapidigi la enkondukon de Esperanto jam nun?

En la nuna situacio de nia movado multaj esperantistoj ofte pensas, ke la ĝenerala enkonduko de Esperanto estos farata de ne-esperantistoj ekz. de registaraj instancoj, kaj ili tute ne atentigas kion ni esperantistoj jam nun povas fari por rapidigi tiun enkondukon. Tial ni volas en ĉi tiu artikolo priparoli kelkajn punktojn, kiuj eble en ĉiuj rondoj aŭ grupoj esperantistaj povos esti diskutataj antaŭ ol la propagando en la venonta vintra sezono komenciĝos.

TURISMO. Unu el la plej gravaj terenoj sur kiu jam nun Esperanto estas utiligebla certe estas la turismo, ĉar vojaĝante al eksterlandoj oni tuj sentas la ĝenon de la lingva diverseco. Tiel ni direktu nian atakon al la turismo en la plej vasta senco, ĉar ligita al la turismo estas diversaj entreprenoj: vojaĝoficejoj, hoteloj, bankoj kaj monŝanĝejoj, muzeoj kaj aliaj publikaj vidindaĵoj en diversaj urboj, aŭtobusentreprenejoj, tramoj, poŝtofoicejoj, informoficejoj, fervojoj k.t.p. Por racie kaj praktike prilabori ĉi tiun vastan teronon la esperantistaro klopodu ĉu individue, ĉu grupe ĉu pere de landaj asocioj iom post iom efektiviĝi la jenajn punktojn:

a. kolekto de adresoj de suprenomitaĵoj instancoj, kie oni jam nun aplikas esperanton, kaj eldono de tiu adresaro serve al alilandaj esperantistoj.
b. kontakti kun la estroj de la diversaj entreprenoj nomitaj por interesi ilin pri Esperanto por ke ili mem aŭ eventuale iliaj personaroj lernu la lingvon kondiĉe ke ni kiom eble

plej multe direktos alilandajn esperantistojn al iliaj entreprenoj. Por pli bone klarigi nian intencon ni volas iom pli detale priparoli kelkajn el la supre nomitaj lokoj.

1. La Stacidomo.

Speciale en kaj ĉe la stacidomoj en grandaj urboj funkcias diversaj oficejoj. Ĉu ne estus dezirinde ke en kunlaboro kun niaj samideanoj fervojistoj ni petu la direkcion fervojan ke ĝi permesu al esperantoparolantaj oficistoj meti dum la deĵoro ŝildeton kun la surskribo „Oni parolas Esperanton“ ĉe la ĝiĉeto kaj ke tiuj oficistoj portu nian insignon? Samtempe ni povas fari klopodojn en tiu direkto ĉe la oficejoj de virina protektado, junularsocietoj, la firmaoj kaj magazenoj kaj gazetkioskoj, kiuj havas sian komeron en la stacidomo aŭ tuj apude.

2. Hoteloj.

Oni sendu al ĉiuj hoteloj cirkuleron en kiu oni unue informu pri Esperanto. Plue oni faru demandojn en ĝi al la hotelestroj. Jen kelkaj demandoj aplikeblaj:

1. Ĉu la hotelestro scias Esperanton? ĉu unu aŭ pli el la servistaro?
2. Ĉu la hotelestro aŭ la servistaro volas partopreni kurson pri Esperanto?
3. Ĉu la hotelestro estas inklina akcepti delegacion de la esperanto-movado por priparoli diversajn punktojn rilate al esperanto?
4. Ĉu la hotelestro permesas, ke Esperanto-gazetoj kaj faldfolioj estu metataj sur la legotablo?

Se iu hotelo en io ajn volas kun-

Famkonata esperantistino

Sendube multaj samideanoj ne scias ke ankaŭ la plej fama franca piloto, Maria Marvingt, estas esperantistino. Kaj - tio certe estas speciale grava -, aktiva propagandistino. Kvankam ŝi jam havas pli ol 80 jarojn, ŝi estas ankoraŭ sana kaj viva tiel, ke ŝi antaŭ nelonge ĉiutage biciklis de Parizo al Versailles! Ŝi posedas 17 internaciajn ĉampion-atestojn kaj la francan ordenon „Honora Legio“. Jam en 1910a ŝi akiris la flugdiplomon kaj verŝajne ricevos ĉi tiun semajnon (aŭ jam ricevis) la ateston de helikopter-piloto! Ŝiajn verkojn pri aviado oni konsideras la plej bonaj el 1948-1949. Kiam vivigis nia movado la konata francino lernis en tre mallonga tempo nian lingvon kaj baldaŭ fariĝis nelacigebla propagandistino. Jam ŝi organizis grandskalan viziton de miloj da samideanoj al Roma. Dum la akcepto de Papo Pio XII lia Sankta Moŝto alparolis la vizitantojn en Esperanto (laŭ nia scio la nura Papo, kiu praktike uzis nian komunan lingvon, kvankam la internacia katolika movado ĝuis aprobon kaj helpon de aliaj, ekzemple de Papoj Pio X, Benedikto XV kaj Pio XI).

Ankaŭ nun Maria Marvingt montras vivan intereson en la evoluo de Esperanto. Ni estu fieraj pro la fakto, ke tia inteligenta virino apartenas al nia anaro!

W.K.

labori, ni, niaflanke, promesas direkti la Esperantistojn eksterurbajn al ĝi Tiel havigante klientojn al la hoteloj, ni estas konvinkitaj, ke el la kelkcentoj da hoteloj kelkaj respondos favore.

3. Banko aŭ monŝanĝejo.

Ni serĉu bankoficistojn, kiu scias Esperanton. Interkonsente kun li ni petu la direkcion, ke li povu servi la Esperantistojn kiam ili venas. Al tiu banko aŭ monŝanĝejo ni direktos la Esperantistojn.

4. Poŝtofacejo.

Ĉe la poŝto estas permesate al esperantisto-oficisto pendigi dum siaj deĵorhoroj tabuleton kun la surskribo: „oni parolas Esperanton“. Ni povas fari propagandon ĉe la poŝtoficistoj. Ili estas facile atingeblaj malantaŭ siaj ĝiĉetoj. Ĉi tiu laboro povas eble bone esti farata en kunlaboro kun la asocio de la poŝtistoj-esperantistoj.

5. Restoracio aŭ Kafejo.

Ekzistas kelkaj restoracioj kie la menuo estas havebla en Esperanto. Ili devas esti pli konataj de la lokaj Esperantistoj. Plue oni povas instigi tie la servistojn lerni la lingvon. Oni ankaŭ povas peti la estron meti tabulon kun la surskribo: „Menuo en Esperanto havebla“ ĉe la fenestro.

Jen karaj gelegantoj jam kelkaj

Originalaj Poezioj de Claude Piron**PRINTEMPO
EN LA MOZA VALO**

La valo
pala
surmetis
kviete
la veston
festan,

kaj majo
gaja
traboris
multflora
la vojon
ĝojan.

Salika
diko
sin fleksas
branĉtekse
kun plora
kor'.

feliĉa
fiŝo
petolas
scivole
el ronda
ond'.

Dimanĉaj
branĉoj
aldonas
burĝonojn
al havo
rava,

la Moza
rozoj
prezentas
talentojn
per skizo
ĉiza.

Alaŭdo
aŭdas
la juron
murmuran
de flama
am'.

dum knabo
rabas
la buŝon
tro ruĝan
de tima
in'.

Mateno
prenis
koloron
plej gloran
laŭ ĝusta
gust'.

Mozfluo
luis
tualeton
koketan
por vala
bal'.

AVERTO

De mia naskiĝo vi nur anarkias
irante laŭvole kaj sen disciplin';
vin gvidas kaprico kaj vi fantazias
sen zorgo pri digno. laŭ stulta kombin'.

Ĉu vi do imagas ke tiel vi povos
ĝis fino de vivo en plena liber'
disvagi senorde, ke mi ĉe ne provos
batali kuraĝe ĝis via konker'?

sugestoj kies efektivigon ni jam nun povas klopodi akiri, sed estas ankoraŭ multaj aliaj temoj, kiujn ni pro spacomanko ne povas mencii. Ĉiu kiu iom pripensas la aferon certe mem povos trovi ankoraŭ aliajn eblojn. Ni proponas ke ĉi tiuj ideoj estu diskutataj en niaj lokaj grupoj kaj estrarkunvenoj. Intertempe ni jam komencu la agadon en la praktiko. Ni superŝutu la homojn per Esperanto-reklamiloj. Ni ataku kune bastionon post bastiono!

Esperanto en la butikoj! Esperanto en la oficejoj! Esperanto en la hoteloj! Esperanto en ĉiuj turistejoj.

Por ni la urbon!
Por ni la landon!
Por ni la mondon!!!

Tensen.

LINGVAJ RESPONDOJ**VIVANTA LINGVO.**

Toto grumbblas dum li faras sian taskon pri angla lingvo:

Mi demandas al mi kial oni devigas min tion lerni!

Kaj lia patro severe riproĉas:
Stultulo! Vi devas lerni tiun lingvon: la duono de la mondo ĝin parolas.

Nu, rediras Toto, ĉu vi ne trovas ke tio jam sufiĉas?

SANCULOJ.

La ekzamenanto: Kian suprecon havis la Romanoj super ni?

La studento: He... He... ili ne bezonis lerni la latinan lingvon!

NOVA LINGVO.

Sinĵorino Novriĉulino gastaceptas. Ŝi prezentas sian junan filon al amikino:

Jes, li jam lernas algebron...ĉu ne, Toto? Parolu iom al sinĵorino en algebro!

Ekdormu, frato kara,
Forgesu pri la lac'.
Disfalis temp' amara,
Hodiaŭ estas pac'.

Se paĉjo kun „adiu“
Foriris en maten',
Forgesu ke hodiaŭ
Ne eblas plu reven'.

Nur sonĝu pri insuloj
En suna malproksim'
En kiuj por etuloj
Ne plu ekzistus tim'.

Vin lulas anĝelkanto
El ora paradiz',
...Neveras, ke lulanto
Frostremas sub ĉemiz'...

Claude Piron

VERDLANDO VOKAS

Sciigoj kaj petoj:

Radio Rio de Janeiro. - Ĝis nun ni ne sukcesis aŭdi la sud-amerikan stacion, eble pro malfavora situo aŭ ne sufiĉe bona ricevilo, sed laŭ „Esperanto“, la organo de U.E.A., ĝi estas aŭdebla bone en Eŭropo, almenaŭ ĝia mallonga ondo.

Bonvolu tial aldoni al la listo:

SABATE:

09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,7 m.: K kaj I.

Ankaŭ I.K.O.R. dissendos en Esperanto! Atentu ankaŭ pri alia grava aldono:

DIMANĈON, la 21-an de aŭgusto 1955-a:

18.10—18.45 Hilversumo II, 298, 188 m., I.K.O.R.: Kantada diservo en preĝejo en Vlaardingen. Meditados pastro H. Onstein el Hilversumo; solkantos s-ino Jelly Koopmans-Schotanus el Hilversumo.

Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TIERKWERD bij BOLSWARD (Frislando), Nederlando.

Kongresaj Impresoj

Sur la unua paĝo de tiu ĉi numero ni presigis belan, ĝeneralan bildon de la Kongresanaro. Ni ĉi sube ankoraŭ aldonas artikolon de nederlanda samideano, kiu donas impresojn pri la Beneluksa Kongreso, pri kiu efektiva raporto jam aperis en nin antaŭa numero:

La plej nova subtenanto de nia movado certe estas Pluvius, ĉar li dum la Pentekostaj tagoj ne verŝis sur nin la de li tiom ŝatatajn pluverojn.

Efektive, ni havis la veteron, kiun ni bezonis. Ne tro varma ne tro malvarma, kvankam la vento kelkfoje klopodis malmildigi la sunradiojn.

Tiujn ĉiutagajn pensojn pri la vetero mi esprimas, ĉar la sukceso de kongreso parte dependas de la vetero, kvankam la organizintoj de kongreso neniel povas influi la veteron.

Kunveni en tropika temperaturo ne estas bagatelo.

Do pri tiu punkto de la programo la kongresanoj povis esti kontentaj.

Kaj la aranĝoj faritaj de homaj fortoj ĉu ili ankaŭ estis konforme al la atendoj de la kongresanoj. Generale jes.

Intence mi skribas ĝenerale, ĉar ĉiam estas grumbantaj homoj, kiuj fakte ne pensas pri la multe da laboro, necesa por glate funkciigi la sinsekvajn partojn de la kongreso. Multe da cerbumado antaŭiris la efektiviĝon. Mi povas juĝi pri tio, ĉar mi mem jam kelkfoje „hakis per tiu ĉi hakilo“ (permesu al mi tiun esprimon.)

Jam enirinte la kongresurbon oni povis konstati ke la L.K.K. ne nur pensis pri la kongresanoj mem, sed ankaŭ zorgis ke „la publiko“ povis vidi kio okazis. Fiere flirtis la verdstelaj flagoj sur la aŭtobusoj kaj memorigis al ni la 39an U.K. de la pasinta jaro. Dum tri tagoj ili atestis ke la verdstelanoj ĉeestis en la urbo por priparoli aferojn kaj ĝui distraĵojn.

En la akceptejo oni tuj sentis la konatan sferon propra al niaj kongresoj, ĉu internaciaj, ĉu naciaj. Dekstre kaj maldekstre manpremad, gajaj ekkrioj de renkontiĝo. Malnovaj kaj novaj amikoj. Efektive la vera sfero esperantista!

Flanke de la akceptejo estis granda salono en kiu la jubileanta societo, reprezentata de la estraro, akceptis la multajn gratulojn. Ne nur vortoj, sed ankaŭ floroj atestis la varmajn simpatiojn de la vizitantoj por la festulo.

Speciale menciinda estas la „ora gratulo“ de niaj Belgaj amikoj.

Sprite, kiel ĉiam, sincere kaj entuziasme, la prezidanto de la Belgaj Ligo gratulis L.E.E.N. Sed, vortoj ne sufiĉas, li diris, kaj li enmanigis al la prezidanto de L.E.E.N. oran medalon, speciale faritan por tiu ĉi okazo.

Kompreneble la kongresanoj restis longe en tiu jubilea sfero al kio multe kontribuis la malavara regalo de la „festporko“. Estis vere grandioza!

Same la posta akcepto fare de la urbestro.

Simpatiaj vortoj de la urbestro. Dankesprimoj de la prezidantoj (Nederl. kaj Belgaj). Tre lerte la prezidanto de L.E.E.N. enŝovis en sian dankvorton iom da propagando. Gravmienaĵo pedeloj envenis kun la „honorvino“ kun aldonaj kaj baldaŭ la salono bluigis pro la fumo de la cigaroj kaj cigaredoj. Gaja, amuza senĝena estis la posta babilado inter la urbestro kaj la akceptatoj.

Kongreso ne nur estas amuzajoj, kvankam pluraj esperantistoj venas al kongreso ĝuste pro ili. Bedaŭrinde, ĉar la aferoj estas grava punkto de la tuto.

Seriozaj aferoj devas esti pritraktataj.

Tio okazis la duan tagon. Ne estas la tasko de iu, kiu nur volas doni kelkajn ĝeneralajn impresojn pri la tuto priskribi ilin detale. Sed mi povas sciigi ke tiu parto ankaŭ restis en harmonia sfero. La kunvenintoj ne daŭre severmiene aŭskultis aŭ pritraktis la aferojn. Kelkfoje aŭdigis gaja rido aŭ spritaj rimarkoj. Ne mankis en tiu ĉi kunveno la trafaj vortoj de la nestoro de L.E.E.N.

Pri la diversaj distraĵoj mi bedaŭrinde ne povas juĝi plene.

Sabatvesperon la kongresanoj arigis en la granda salono de Kunsten en Wetenschappen kaj interesplene aŭskultis la ĉarmajn kantojn kaj gajan skeĉon. Kompreneble oni ankaŭ dancis. Kongreso sen balo ne estas kompleta.

Dimanĉvesperon estis la kulmino de la distra parto. Oni certigis min ke la prezentadoj estis altnivelaj kaj plene kontentigis la aŭskultantojn. Verdire, estis pura artvespero, kiu certe imponis la ĉeestantojn kaj postlasis pripensindajn memorojn.

Kaj, kiom la ekskursintoj ĝuis Mar-don!

Mi vidis la alvenon de la feliĉuloj. Lacaj, polkvovritaj (eĉ grasmakulitaj) ili alvenis, sed ne gravis, ili multe ĝuis la belan naturon en nia lando.

Kaj la fino venis.

Denove dankesprimoj, kuraĝigaj vortoj, invito al Gent por la sekvonta jaro. Denove manpremad, „ĝis revidoj“ k.t.p. k.t.p. La tria Beneluksa kongreso estas historio.

Neforgeseblajn tagojn ni pasigis en Utrecht, kies Domturo (feliĉe el papero) ornamis kelkajn tagojn la kongresanojn.

La L.K.K. meritas la dankon de ĉiuj. Multe ili faris por ke la kongresanoj povu esti kontentaj. Kaj ili certe estis.

Niaj Belgaj Kongresoj

La Prezidanto de la Verviersa Grupo gentile atentigis nin pri la fakto, ke la 14a Kongreso, en 1925, okazis ne en Spa, sed en Verviers. Nur la lunda tago kondukis la Kongresanaron, ekskurse, al Spa. Ĉar multaj konservos tiun kompletan liston de la belgaj Kongresoj, ni represigas ĉi sube la tutan liston.

- la 1a: 1909: Verviers
la 2a: 1910: Bruĝo
la 3a: 1911: Charleroi
la 4a: 1912: Gento
la 5a: 1913: Spa
la 6a: 1914: Mehleno
la 7a: 1915: Bath (*)
la 8a: 1916: York (*)
la 9a: 1920: St. Gilles
la 10a: 1921: Lieĝo
la 11a: 1922: Sia Nikolao
la 12a: 1923: Namuro
la 13a: 1924: Bruĝo
la 14a: 1925: Verviers
la 15a: 1926: De Panne
la 16a: 1927: Mons
la 17a: 1928: Antverpeno (*)
la 18a: 1929: Gento
la 19a: 1930: Lieĝo
la 20a: 1931: Nieuwpoort
la 21a: 1932: Antverpeno
la 22a: 1933: Bruselo
la 23a: 1934: Antverpeno (*)
la 24a: 1935: Bruĝo
la 25a: 1936: La Louvière
la 26a: 1937: Antverpeno
la 27a: 1938: Charleroi
la 28a: 1939: Loveno
la 29a: 1940: Bruselo (*)
la 30a: 1946: Bruselo (*)
la 31a: 1947: Antverpeno
la 32a: 1948: Charleroi
la 33a: 1949: Bruĝo
la 34a: 1950: Spa
la 35a: 1951: Bruselo
la 36a: 1952: Bruĝo
la 37a: 1953: Antverpeno (*)
la 38a: 1954: Lieĝo (*)
la 39a: 1955: Utrecht (*)

(*) La 7a kaj la 8a estis organizataj de belgaj samideanoj, kune kun la briĝoj.

La 17a, en 1928 en Antverpeno, okazis en la kadro de la XXa Universala.

La 23a, en 1934, estis antaŭvidata en Spa: sed pro la morto de la Liga Prezidanto S-ro Frans Schoofs, ĝi estis anstataŭata de ĝenerala kunveno en Antverpeno.

La 29a, en 1940, estis antaŭvidata en Tornaĵo: sed fakte organizita en Bruselo. Pro la milito ĝi tamen ne okazis: same kiel ne okazis tiu planita en la ĉefurbo, en 1946 pro la ne jam sufiĉe restariginta movado.

La tri lastaj Kongresoj, (37, 38, 39) okazis en Beneluksa kadro kaj la proksima, — en Gento 1956, — estos jubilea: la 40a!

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ

SOLVOJ

191. Pipeto, radaro, ordono, mitingo, estrado, savano, okulo, nomado, etiketo, mamumo, aspirino, timida, insulino, gazono, agendo, skotero. Promeso ne satigas.

192. Hor.: robot; sprot; deĵor; pagpag; rezed; poliomjelit; fiakr; etern; eks; strig; takel; abi; libel; melon.

Vert.: rip; fusil; agoni; aprob; odal-lak; teg; regal; emi; sor; estim; prevent; eskal; elitr; ted; nilon.

193. ANSTATAŬIGU

unu literon en la sesliteraj vortoj respondantaj al la unua difino de ĉiu duo de la subaj difinoj, por trovi vorton respondantan al la dua difino. La novaj literoj en ĉiu dua vorto, samorde legataj, formas proverbon.

1. speco de leĝo; partizanmilito. 2. plata peco el ligno; gaso en botelegoj por la kuirado. 3. nenormala peza dormo; legomo. 4. parto de pafilo: greno. 5. iu sekrete observanta; solvaĵo de sukero. 6. ŝtupetaro; muzikistaro. 7. riĉa rusa kamparano; birdo. 8. ina estaĵo; mamulo. 9. malnova lingvo; alta teraso. 10. posttagmanga ripozo; rondforma ujo kun tenilo. 11. masonaĵo ebliganta hejtadon; religiulo. 12. diablo; plej respektinda. 13. ina estaĵo; profunda valetto. 14. mallarga, maldika plato; vitrosimila glazuro. 15. malseketa; malfiera. 16. ŝtofo; vesto de servisto. 17. hungarmaniera raguo; boatego. 18. floro; ŝipvidisto. 19. vasta etendaĵo da akvo; kampfloro. 20. pentristo ĝin uzas; moderna substanco kun plastikaj ecoj. 21. levmaŝino; sento de sufoko. 22. sennuba; senindulge; punanta. 23. kapvesto; glatigl. 24. pantaloneto; ano de iu junularmovado. 25. floro; molusko. 26. atentigi pri danĝero; iri transportate. 27. longa rakonto; maĉdento. 28. ataki; kapti por malliberigi. 29. eleganta ĉambro; pompa. 30. birdo; beletra rakonto. 31. ridindiga verko; luebla aŭtomobilo. 32. sukplena frukto; mallarga metala plato. 33. leda strio; ekstrema malriĉeco. 34. solido el la geometrio; multpieda krustulo.

194. KRUCVORTENIGMO

Horizontale: 1. instruita; neaŭtentika (R). 2. alte taksi ies valoron (R). 3. virina diaĵo; fotilo (R). 4. postmorta transmigrado de la animo en alian korpon (R). 7. helpi pro ofica devo (R); intence ne atenti (R). 8. korpoparto (R). 9. grenbrando (R); besteto ofte uzata por vivisekco (R). 10. rapide kaj ripete ŝanceli (R). 11. studento en oficira lernejo (R); ilo sur kiu oni ĉirkaŭvolvas fadenon (R).

Vertikale: 1. alta herbo kies sekigitaj trunketoj estas uzataj kiel bastonoj (R); laŭvoĉe komprenigi al iu ke li venu (R); 2. arbeto ĉiam verda (R). 3. sekreta kombinaĵo por trompi iun (R). 4. movo sendependa de la volo (R). 5. ludkartoj;

Por viaj esperantajoj, libroj, insignoj k. c.

Belga Esperanto-Instituto

26, Oostenstraat, 26
ANTVERPENO

kiu ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.

ceremonia vesto por viro (R). 9. riĉegulo (R). 10. litero. 11. nobelo (R); artefarita silko (R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G.J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs, Amsterdam-Z.; la membroj de F.L.E.E. aŭ R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge antaŭ la 15/VIII/1955.

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

„In 't Duiveken“ (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj

(5% rabato al Esp.)
Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejlaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.

Suoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arhitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
Henny de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Privataj lecionoj
Roger Jaumotte, Cyriel Buysestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiusp. iloj por la hejmo. Tel. 32.43.88
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.

Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20

J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-eksplado. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumoj, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijk, Oude Doncklaan 106, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj
M. Blajwas, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamojn en siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
„De Boerincens“ (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumajoj
Van Kerkhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forgaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj
gardenilaro
Butiko Angora, (galerio). Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportsuoj
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nelis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE“, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Lielens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CABRELAGE „Carrart“, 19, avenue de Saxe 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikajoj, jurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „DEX“ 16, rue Esnest Laude 15.28.29

BIBLIOGRAFIO

RETO ROSSETTI. - „*El la Maniko*” - originala novelaro - de R. Rossetti kaj J. Hartley. - STAFETO, belliteratura eldonserio, 3 - J. Régulo, eldonisto La Laguna, Kanariaj Insuloj - 1955 224 p. - prezo: 12 angl. ŝil. aŭ 1.80 us. dol.

La observemon de la aŭtoro, cetero lektoro pri artoj, kiun ni jam notis en recenzo pri liaj versaĵoj(1), niaopinie plej trafe reliefigas en la novelo, disponiganta por li favoran kadron por rapidaj, sobre realistaj kaj artismaj skizoj, foje per streko eĉ pli gracia („la verdo saŭmas”, „la ora nebulo de ilia ĝuado”).

Inspirite de l'propra medio, la imaga nutrita de vivsento (eĉ en simpatiaj pli ampleksaj „detektivrakontoj”), li surscenigas en mallongaj aktoj maturiĝintajn junulojn, i.a. artklaseoj, en konforma atmosfero. Kontraŭe al tiuj de Stellan Engholm (2) ili estas kvazaŭ senproblemaj kaj praktikcelaj, pli humuraj kaj, kvankam pli surfacaj, malpli... „surpape-raj”. La aŭtoro, nete konturante, kapablas psikologie verigi ilian agon: jen aŭdaca revo kiu subite senaplobas antaŭ la nespertita; jen hezitemo kiu aspiras plifirmigon...

Aliaj el la dekkvin ne ĉiuj egalvaloraj novel(et)oj, inspiriĝis de okaza arbarista vivo dum milita kaj la kontakto kun originalaj tipoj. Iu elstare pritraktas taglibre fatalan amaventuron de mezaĝa fraŭlo-profesoro. Ĉiuj prezentas rekomendindan legaĵon, ne nur supere distran sed laŭstile interesan. Pledas por la talento de la verkisto, la fakto ke li per pli-malpli ordinaraj okazaĵoj, kun iom surpriza fino, kapablas vekteni la atenton, i.a. per la naturaj karakteraj reagoj de liaj „herooj”.

Plue enŝoviĝis „*La Esperanta Vortludo*”, bonhumora studo (en kiu ĉiuj klasikaj ekzemploj, krom: „*kiam vespo pikas vin sendolore, kion vi devas respondi?*” „*Bonan vesperon!*”) kaj „*La Neologismologio*”, kiujn ni cetero ne volonte malhavis. La lasta, lertspirita ludo laŭ la intelekta ŝato de la aŭtoro, tuŝas problemon ĉiam aktualan al kies solvo li kunlaboras, ne kiel ni diru kunkulpulo sed kiel... komplico. Se ankoraŭ en 1933 *Kalocsay* elokvente defendis la neologismon, ankaŭ rilate la... „altan” prozon, nuntempe simpla arbaristo jam parolas plimoderne ol klera esperantisto pri „*ĉigra porko kaj povraj, magraj bestoj*”. Ni nur konstatas. Abundaj vortklarigoj iĝis esence parto de la eldonoj kaj la leganto, konfuziĝonte aŭ ne, scivolas pri la „novaj, necesaj pliriĉigoj”. Paranteze, ne ĉiuj „no-

vaj” vortoj, troveblaj aŭ ne en Supl. de P.V., nek ĉiuj uzitaj interjekcioj ĉitie enlistiĝis.

Aliflanke ni ne kaŝu, kion la laŭdinda „*Stafetestro*” sur la kovrilo de la laŭkutime belaspekta volumo (ki- am binditaj ekzempleroj?) nomas emfaze lia „*noveca, literaturpionira lingvo*”. Ni ja dubas pri la taŭgeco de iu vortuzo, de diversaj esprimoj, sed konfesas, ke ni ĝenerale ĝuis tiun novecon en dialogo kaj monologo.

„*Hola!*” vokis Merlin. „*Jen bela loĵalo. Vi laboras ĉe unu firmo kaj manĝas ĉe la konkurenco!*”

„*La publiko estas kaprica kaj mi estas ano de la publiko - kion fari?*” filozofis Ben, sidigante. „*Nu, kio nova?*”

„*Nur ke la mondo modernigas en ĉiuj anguloj*” diris Merlin. *Hinda raĝo* (3) volas aĉeti akciojn de persa nafto.

„*Nu kaj?*”

„*Simple ke li ne estas raĝo kaj la akcioj estas fiktivaj*”

Ili estas senĝene naturaj, plezure familiaraj, ofte mallongfaze rektaj kaj ironie blagaj. Ili tiel vigligas la rakonton, ke ni „orelstreĉe” kunaŭskultas. Kaj se „interjekcio” ankaŭ estas neologismo, ni „ĉit”, rapidas absolvi, ĉar „*hojla!*” „*Sankta sakramento!*”... „*Al kukolo!*”... estas „*felix culpa*”.

*** Tyneverum.

FUNDAMENTA KRESTOMATIO, 17a eldono. Prezo F. 10,50. Mendebla ĉe U.E.A. kaj ĉe enlandaj libroservoj.

La tuta esperantistaro povas gratuli kaj danki la Esperanto Publishing Company Ltd, Rickmansworth, Anglujo, ke ĝi finfine povis aperigi, ĉi tiun gravan verkon kompilitan de nia majstro D-ro Zamenhof. Bele presita per eleganta litertiparo sur tre bona papero kaj fortike bindita en tolo kun surprisaj oraj kaj verdaj ĝi vere akiris indan veston. La teksto estas nealiigita sed centoj da notoj kaj klarigoj estas aldonitaj de S-roj William Bailey kaj W. J. Downes, ambaŭ bonaj konatoj de la Zamenhofa lingvo. Per ĉi tiuj notoj kaj klarigoj la libro fariĝis vere ne mankipova por ĉiu esperantisto, kiu volas studi la evoluon de nia lingvo de la komenca periodo ĝis nun. Tamen ni povas kompreni ke ne ĉiuj samopinios pri la diversaj notoj kaj klarigoj ekz. pri la uzado de „de” aŭ „per” en la pasivo.

Nemirige estas ankaŭ, ke malgraŭ la plej zorge farita trarigardo oni pretervidis kelkajn malglataĵojn. Ekz. en la fabelo de Andersen pri la Novaj Vestoj de la Reĝo troviĝas la frazo:

„Li ne zorgadis pri siaj soldatoj, nek pri teatro kaj ĉaso, *esceptinte* nur se ili donadis al li okazon montri siajn novajn vestojn.” En ĉi tiu frazo la vorto „*esceptinte*” ne estas ĝusta, ĉar ĝi ne rilatas al la subjekto kaj do devus esti „*escepte*”. Sed tio estas nur bagatelo rilate al la grava laboro farita. Ni elkre rekomendas la libron kaj esperas ke ĝi trovos multajn aĉetantojn por ke la eldonista firmao havos la kuraĝon kaj la financajn rimedojn sammaniere reaprigi la tutan Zamenhofan verkaron nun elĉerpitan.

F.W.

JAPANAĴ ELDONOJ. - 1) OGURA-TOYOFUMI - „*Kun la Kadavro de l'Edzino*” trad. el jap. Tanako-Sadami ilustris Maruki kaj Akamacu - 52 p. Prezo: 6 r.k.

2) „*La Ĉasteco de Japanio*” el la japana; 41 p. Prezo: 4 r.k.

3) HASEGAUA-TERU „*En Ĉinio Batalanta*” - Malgr. Bibl. n-ro 4; 106 p. Prezo: 7 r.k.

Eldonis Japana Esperanta Libro-kooperativo - Osaka -

La unua, — valora dokumento — pritraktas la abomenajn sekvojn de la atombombo sur Hiroŝimon. Postvivanto, profesoro ĉe la tiea universitato, sinrege trafe raportas en ĝi per kortuŝa simpla, la apokalipsajn travivaĵojn, dum kiuj li perdis la edzinon pro atombomba malsano.

La dua jam ne estas legaĵoj por ĉiuj pro la kruda detalado de kruelaj atencoj kontraŭ japaninojn fare de usonaj soldatoj, kun historio de la t.t. „panpanoj” t.e. prostituitinoj por alilandanoj.

La lasta fine, estas speco de taglibro de japana esperantistino, sekrete forlasinta kun hina edzo, en 1937, parencojn kaj patrujojn, kaj en kiu ŝi skizas kun simpatia talento, siajn sentojn kaj spertojn en Sanhajo, Hankou kaj Kantono, en la japan-hina milito, dum kiu ŝi kunlaboris en kontraŭ-japana propagand-organizo.

Estas agrabla sento rekte kompreni orientanojn per Esperanto, kvankam ankaŭ en tiuj ĉi broŝuroj — la lingvaĵo ŝajnas troe influata de la naciilingvo. La verketoj estas sendube lernigaj pri orientaj situacioj antaŭ kaj dum la milito, kaj pri la agado de kerno da esperantistoj japanaj kaj hinaĵ en la servo, same de la ruĝa kiel de la verda steloj. Sed verdire estas foje ekstravaganca kaj sufiĉe deprima legaĵo. Zamenhof jam sciis ke „*frat' fraton atakas ŝakale*” kaj vane oni emas meti difinitan popol-etiketon sur tiun, ve, eternan verajon.

TYN.

(1) „*Kvaropo*” - (2) „*Vivo vokas*”

(3) ... *plibonigita*” *raĵao* (P.V.)